

MEDITERANEA ESPERANTO-SEMAJNO

25.2. - 3.3.2012

Jam la 6-an fojon okazis en Francio ĉe la Mediteranea maro la Esperanto-Semajno. Organizas ĝin Monique Prezioso kaj Christine Graissaguel el la E-grupo de la urbo “Saint Raphaël”. Antaŭajn jarojn ĝi okazis en la urbo “Agay” kaj ĉi-jare oni elektis la rezidejon de “Vacanciel” ĉe la marbordo de “Les Issambres”. Ĝi troviĝas inter la urboj “Fréjus” kaj “Saint Tropez”.

La eventon partoprenis ĉirkaŭ cent geesperantistoj, precipe francoj, sed venis gastoj el aliaj eŭropaj landoj: Belgio, Ĉeĥio, Finnlando, Germanio, Hispanio, Hungario, Italio, Svedio kaj Svislando. La aranĝo okazis en luksa apudmara hotelo, kie en la pasinteco feriiis miliarduloj. Post ilia foriro ĝi estis transformita en libertempan restadejon kun bele aranĝita parko. Al ĝi ankaŭ apartenas kelkaj komfortaj dometoj situantaj sur monteto. En apuda konstruaĵo okazis ĉiuj aktivaĵoj de la Semajno.

Matene kaj vespere, antaŭ la manĝoj, okazis E-kursoj de diversaj niveloj. Ni povis pliprofundigi niajn sciojn pri la historio, perfektigi la E-lingvon kaj ĉefe la gramatikon. Instruis Perla Miele el Hungario, Zsófia Kóródy kaj Peter Zilvar el Germanio, Pascal Vilain kun sia edzino Mari-Roza kaj Daniel Moirand el Francio. Bone funkciis ankaŭ la libroservo.

La posttagmezoj estis liberaj kaj ĉiu povis elekti sian aktivaĵon.

La bela naturo kun florantaj kaj bonodorantaj mimozfloroj logis al montaraj aŭ ĉemaraj promenoj. Pluraj el ni vizitis pli malproksiman ĉirkaŭaĵon peraŭte aŭ buse. Merkrede posttagmeze ni ŝipveturis al la famkonata (pro la filmoj pri Ĝendarmoj) apudmara somerrestadejo “Saint Tropez”. De la maro ni vidis luksajn domojn kaj vilaojn de konataj francaj aktoroj, artistoj, kantistoj kaj de aliaj milionuloj. Post agrabla promonado en la pitoreska urbo ni revenis al “Les Issambres”.

Vespere ni povis ĝui programerojn de la hotelo (kabaredo, kantado, maskobalo...) kaj ankaŭ la niajn. Peter kaj Zsófia prezentis al ni la Esperanto-urbon “Herzberg” en Germanio kie ili vivas kaj aktivas. Ili invitis la ĉeestantojn al la fervojista kongreso, kiu okazos tie en majo. La geedza paro Hubert kaj Michèle el Belgio prezentis siajn E-aktivaĵojn dum la jaro 2011, Saliko el Finnlando parolis pri sia lando kaj ties kutimoj. Jean-François Cousineau el Francio prezentis unikan filmon pri sia vojaĝo al Sumatro kaj ties aventuroj. La lasta vendreda vespero estis dediĉita al prezentoj de la partoprenantoj. Ni aŭdis kantojn, poemojn, skeĉojn, humuraĵojn kaj fine oni ankaŭ invitis al dancado en akompano de akordionoj. La etoso estis gaja kaj agrabla. Sabate matene okazis lastaj kursoj kaj post la tagmanĝo ĉiuj disiĝis al siaj hejmoj. Ni ĝuis agrablan semajnon en bela regiono de suda Francio, kie abundis florantaj mimozoj.



Kursanoj sub la gvido de Zsófia Kóródy